



FLANDRA ESPERANTISTO

MONATAJ REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

ENHAVO :

Okaze de la Centjarfesto de Guido Gezelle. — Tri Poemoj de Guido Gezelle : 1. Kor' mia estas kiel Flor' ; 2. La Skribisteto ; 3. La Flandra Lingvo. — Guido Gezelle — La Okuloj malfermiĝas ! — Subteno por nia Revuo. — Guido Gezelle 1830-1930 (gravuraĵo). — Ricevitaj Revuoj. — 1a Flandra Kongreso de Esperanto. — Bibliografio. — Marŝkanto de l' Blinduloj de la Nederlanda Gento. — Pri la pseŭdo-“Kataluna Esperantisto”. — Esperanto door Zelfonderricht. — Inter Ni.

JARA ABONPREZO : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

Tarifo por anoncoj : 1/1 paĝo, fr. 125.— ; 1/2 paĝo, fr. 70.— ;

1/4 „ , fr. 40.— ; 1/6 „ , fr. 30.— ;

1/8 „ , fr. 25.—. Perantoj ricevas rabaton.

FLANDRA ESPERANTISTO

Organo de la Flandra Esperanto - Movado

APERAS ĈIUMONATE.

Redaktoro kaj Administranto :

JAN VAN SCHOOR

Julius De Geyterstraat, 149/1, Antwerpen.



Jara abonprezo : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

Poŝtĉeko : 1735.09

Okaze de la centjarfesto de Guido Gezelle

Antaŭ mi staras la bildo de la majstro...

Mi relegis liajn verkojn, liajn poemojn...

Kaj leviĝis en mia koro granda silento, senlima malĝojo kaj grandega admiro...

Ĉar, ankaŭ li sentis en sia koro, — simpla kaj pia, — la humiligon pro sia korinklino, pro sia amo por sia popolo kaj ĝia lingvo. Ankaŭ li spertis la akraĵojn de la ekzilo for de medio, al kiu tute lia koro estis alrokita.

Ĉu estas necese doni datojn el la vivo de la majstro?

Li naskiĝis la 1an. de majo en 1830. Lia patro kiu estis arb-kaj florkulturisto havigis interesiĝon al li pri la grandeco, la beleco de la vivo en libera naturo.

Ho! Ĉio estis tiel bela, tiel die bela meze de floroj, plantoj, birdoj! Ĉio estis tiel kolorriĉa sub la radiantaj, dia suno! Kaj li ekamis jam de sia juneco tiun naturon, pri kiu lia patro parolis kun tiom da amo.

La vivanta naturo kaj la enpensiĝa preĝo estis la plej amataj aĵoj por la juna Gezelle.

Li ekstudis en la seminario por ekleziuloj en Roesselaere. Tie li havis la okazon aŭdi la diversajn dialektojn el la flandra lingvo. Tie li ekkunigis la diversajn esprimojn kaj vortojn el la aliaj dialektoj, ĉar la amo por lia landlingvo fariĝis lin granda majstro kaj influis lin dum tuta lia vivo. Ankaŭ tie li poemis la verketon: "La Mandelrivereto".

129

AL LA LEGANTO.

La artikolo "La Okuloj malfermiĝas",

paĝo 135, daŭrigas paĝo 138.

LA PRESISTO.

De 1850 ĝis 1854 li studis en Brugge, skribis de tempo al tempo poemojn okaze de festaj aŭ funebraj okazoj; multe el liaj poemoj oni ankoraŭ nun povas trovi presitaj sur mortbildetoj, en malnovaj preĝlibroj, k. a.

En 1854 li estis pastrigata kaj enoficigata kiel komerca profesoro en la sama lernejo en Roesselaere, kie li iam studis.

En 1857 li akiris por si plej taŭgan taskon kaj iĝis profesoro en gramatiko, poezio kaj retoriko. Kaj nun li estis kontenta. Inter liaj lernantoj troviĝis la fama Hugo Verriest kaj lia frato Gustaaf.

La lecionoj, kiujn donis Gezelle, estis por liaj lernantoj horoj de vera dia ĝuo. Mondo de beleco kaj spiriritiĉeco malfermiĝis antaŭ ili. Li malkaŝis por siaj lernantoj la grandecon de la naturo: floroj, arboj, birdoj, abeloj, riveroj, ĉion li paroligis ĝian propran lingvon.

Sed lia plej granda tasko estis: vekti en la koro de siaj lernantoj profundan amon por la flandra lingvo.

Verriest diris pri la lecionoj donitaj de Gezelle: "Nova juna Flan-
drujo vekigis: ni vivis, ni leviĝis, ni fieriĝis, ni estis fortaj kaj
belaj, kaj kunportis tra la vivo la jubilantan senton de nia propra
parolo, nia propra arto, nia plej alta memstara vivo."

Li sentis sin mem poeton.

Li faris poetojn.

Ĉar en tiuj jaroj li poemis kun kaj por siaj lernantoj multajn mirindajn poemojn, kiuj estis eldonitaj en 1858, nome "Poemekzercoj" kaj "Tombejfloroj". Post kelka tempo aperis "XXXIII Poemetoj". Inter la verkoj de Gezelle, neniu estas tiel unuanime kaj tutkore admirata kiel "Tombejfloroj."

Tiuj dolorplenaj paĝoj, tiuj larmoj de kristana kunsento, tra kiuj radias la kristana espero, formas verkon, kiu restas la plej plenklara, la plej pura en la verkaro de la Majstro kaj de la Nederlanda literaturo.

Tiuj ĉi poemaroj multvaloras ankaŭ kiel pruvo de lia ora pastro-koro.

Multfoje parolis en siaj verkoj la "pastro", la "kristana gvidanto", kiu vidis ĉirkaŭ si la spiritan kaj materian mizeron kaj laŭte elkantis la glorĝojon de la fina liberiĝo; — la kristana gvidanto, kiu ankaŭ vidis la belecon de la vivo kaj dankegis la Kreinton pro tiom da bonaĵoj. En tiuj ĉi verkoj gloriplene kaj riĉkoloro vivas la naturo; vivĝojo kaj pia korsento elradias el ili kaj precipe granda amo por la Kreinto, por la homaro kaj por siaj "infanoj", kiel li nomis siajn lernantojn.

Sed ne nur la naturbelecon li al ili vidigis, li gravuris en la kordon de siaj disĉiploj la dependecon kaj la dankemon al Tiu, Kiu estas la Kreinto de ĉio.

Sed tiu elkora kamaradeco por liaj disĉiploj, tiu plenvivado de la vera vivo, tiu komprenigo de la beleco kaj de la vero, — kamaradeco kaj vivkoncepto, kiu kontraŭstaris la kutiman sintenon de la aliaj profesoroj, faris multajn malamikojn por Gezelle.

De Novembro '57 ĝis Aŭgusto '59 daŭris la du mirindaj jaroj dum kiuj kantis kaj vivis la Majstro kun siaj lernantoj... Tiam, subite, frapis lin forta bato, kiu ekmalserenigis lian vivon kaj forviŝis la kantojn de liaj lipoj.

Liaj lernantoj ploris kiam Gezelle forlasis ilin. Oni lin nomis vicrektoro en la Angla Seminario kaj profesoro en filozofio (1860) kaj poste vicpastro en la Sankta Walburgis Paroĥo.

Pri tiu parto de lia vivo, ni parolas nur kun profunda doloro, ĉar en la majstra koro io rompiĝis: lia fido en la homoj, — la homoj, kiujn li opiniis tiel fidindaj kiel si mem.

“Oni” lin traktis, oni lin persekutis kiel sovaĝa besto. Lia delikata koro estis vundita tiel grave, ke li ne kapablis eldiri sian doloron.

Li skribis ja ankaŭ “leterojn” al Hugo Verriest “Kiel vi fartas”, al Eug. Van Oyen aŭ Karel de Gheldere “Tiu vesper’ kaj tiu rozo” kaj la singulta preĝo: “Sur mont’ vi preĝis, sola”.

Sed ne plu estis la iama kantanta fonto...

Li vivis en plena malriĉeco por helpi aliajn en iliaj mizeroj kaj klopodis trovi la perditan ekvilibron per la studado de la popollingvo. Li faris popoleldonon “Ĉirkaŭ la Fajrujo” en '65 kaj iom poste, la eminentan lingvoeldonon “Loquela”. Sed li nun parolis pri si mem kiel pri “la mortinta poeto”.

En 1871 li iĝis vicpastro en la Sankta Virgulina preĝejo en Kortrijk. En tiu nova medio la maljunaj vundoj malrapide fermiĝis: envenis en lin korkvieto; la ĝojo revenis kaj liaj okuloj kaj koro malfermiĝis por la ĉiam nobla gloreco de la kreitaĵo de Dio. Kaj li denove ekpoemis post dudek jaroj da silentado. Iom post iom revivis la neceso poemi kaj li denove pro tio ĝuis. Verriest pri tio diris: “la dormantaj florburĝonoj ekrevivis; printempis, eĉ varmege someris”.

En 1893 aperis lia volumo “Tempa Krono”, sed li restis neaprobata: la juĝantaro, kiu aljuĝis la kvinjaran literaturpremion en Flandrujo, juĝis ke tiu verko estis la malplej interesa el ĉiuj aliaj verkoj, tial ke li skribis — tiel oni riproĉis al li! — en sia propra dialekto: la okcident-flandra.

Ankaŭ en la sekvantaj volumoj “Versgirlando” kaj en liaj “Lastaj Poemoj”, eldonitaj post lia morto, ni trovas trezoron da versoj, kiuj estas ĉiuj perfektaj, plenkreskintaj versoj pro sia muzikriĉeco aŭ freŝa klareco aŭ mistika pieco.

Li estis poeto per dia favoro. Ses monatojn antaŭ sia morto, li

iĝis Direktoro de la "Monahejo de la Anglaj Fraŭlinoj". Tiu tasko ne lasis al li multe da libertempo por sin transdoni al la arto.

Post vojaĝo kun sia episkopo en Anglujo, li revenis malsana kaj mortis en Brugge, dimanĉon la 27an de novembro 1899.

Lia kuzo, Cæsar Gezelle, troviĝis apud la mortlito kaj aŭdis la lastajn vortojn de la Majstro.

Tiuj estis: "mi estas vivinta en simpleco de l' koro kaj de l' vero". La tuta flandra popolo troviĝis apud lia ĉerko. La granda ĉefpreĝejo de Brugge estis tro malgrandra por enteni ĉiujn, kiuj nun jam tuj post lia morto, kromprenis ke grandega Flandro estis vivinta inter ili.

La supertera "Ego Flos" verkita dek tagojn antaŭ lia morto, certigas nin, ke la finiĝo de lia vivo estis plena je korpaco, ke li dankeme redonis sian vivon al sia Kreinto; — sian vivon, kiu estis tiu de vera poeto, de profundpia, mistika viro, kiu akceptis dolorplene la akran kalikon de la humiligo pro sia amo por sia flandra popolo. Li malplenigis tiun kalikon ĝis la fundo, tial ke li sciis ke post sia morto, generacio leviĝus, kiu celus la saman idealon pro kiu Li, nia Majstro vivis kaj mortis: la liberigon de la flandra popolo!...

GOMMER TORFS.

Tri Poemoj de Guido Gezelle

Kor' mia estas kiel Flor'

Kor' mia estas kiel flor':
malfermiĝinta aŭ fermita
ĝi sunradiojn kaptas aŭ
suferas, velkas ja rompita!

Kor' mia kvazaŭ juna herb'
en roso de l' mateno spiras;
sed vivolaca, dum vesper',
plenpolva, morton nur sopiras!

Kor' mia kreskas kiel frukt':
en ombro kaŝe maturiĝas
ĝi, antaŭ de l'aŭtuna man'
tro frue, ve, l'arb' elrabiĝas!

La koro mia kvazaŭ stel'
falanta, de l'ĉielo strias
la altajn murojn per fajrer',
sed poste tuj ekmalradias!

Kor' mia kiel ĉielark'
kun volbo alte starigita,
per ruĝ', blu', verdo, flav', purpur'
solviĝas baldaŭ, forviŝita!

Kor' mia, ho malforta kor',
la ĝojo vin ŝanĝema trovas.
Se vi bonfartas dum moment',
malsaton tagojn sufer-povas!

Trad. HECTOR VERMUYTEN.

La Skribisteto (*)

Ho, moviĝadanta akvobesteto
kua via nigra vesteto,
mi amas kapeton vian glitantan
sur l'akvaj ondoj skribantan!
Vi kuras, moviĝas tiel rapide
sen kruroj iaj, nek brakoj;
vi konas la vojon tiel bonege
sen ia, vere, okulo.
Sed kio vi estas, estis aŭ estos?
Klarigu tion kaj diru!
Ho, brila aĵeto, nelaciĝebla
por skribi, kio vi estas?
Vi kuras sur l'akvo hela kaj freŝa,
kaj ĝi ne pli movetiĝas
ne pli ol se estus dolĉa venteto
sur l'ondo dolĉe glitanta.
Skribistoj, skribistoj, al mi do diru,
— vi estas ja dudekope
kaj ĉu do neniu tion klarigos—
vi kion tie skribadas?
Vi skribas, sed akvo tion ne
[montras;
vi skribas: jam ĝi foriĝas;
neniu kristano tion komprenas;
ho, skribisteto, klarigu!

Ĉu do pri fiŝetoj skribi vi devas?
Aŭ ankaŭ pri herbajetoj?
Ĉu do pri ŝtonetoj, floroj, folioj,
pri akvo, kie vi kuras?
Ĉu do pri birdetoj dolĉe kantantaj,
aŭ pri la blua ĉielo
profunde brilanta super kaj sub vi,
aŭ skribistet' ĉu pri vi mem?
— Kaj la turniĝema, lerta besteto
kun sia nigra kapeto,
jen ĝi fierete levis l'orelojn,
momenton unu ĝi haltis:
"Ni skribas", ĝi diris, "turniĝa-
[dante,
nur kion iam la Majstro,
kreante kaj instruante ordonis:
nur unu ja lecionon;
ni skribas... sed ĉu vi tion ne legas?
Vi estas tiel neklera?
Ni skribas, reskribas, ĉiam re-
[skribas
la sanktan nomon de Dio!

Trad. MAUR. SEYNAEVE.

(*) *Flandra nomo de malgranda nigra besteto: "Gyrinus natans", kiu per tre rapidaj movoj ĉiuflanken glitadas sur la akvo.*

La Flandra Lingvo

Vi estas dolĉa flandra mia
por kiu ne perfortas vin,
kontraŭe ja en koro sia,
nur daŭre ripozigas vin,
en kiu vi protektbezone
dormadis, ĝis en plenliber'
vi vekiginte kaj belsone
el buŝo iras en fier'!

Kolorbelega aŭdimpres',
animorava sentkares'!
Ho flandra lingvo, via art'
nur malvolviĝas per dissem'
de viv' kaj nedirebla bel',
incens-fumanta di-poem',
el ujo dolĉa al ĉiel'!

Trad. HECTOR VERMUYTEN.

GUIDO GEZELLE

Post la unuaj flandraj poetoj, kiuj, post 1830, havis la meriton revivigi la iam preskaŭ mortintan literaturon, puran belecon alportis precipe Guido Gezelle, la plej originala poeto de la 19a jarcento, „la poeto laŭ dia favoro,” unue preskaŭ nekonata aŭ ne ĝustvalore taksata.

Li estis la poeto de la bela flandra naturo, religia lirikisto, kiu sentis ĝin kiel rivelado de la dieco. Al ĉio, eĉ la plej malgrandaĵo en la naturo, li donis iom el sia koro, kiu elŝutis poezion, lia spirito ne sin okupante pri skolo, reguloj nek konvencio. Kaj li tiel kreis al si ritmotrezoron kaj lingvon sukan, pitoreskan, ĉerpitan el la popolfonto, kaj tamen lingvon delikatan. Nur skribante pro interna puŝo, li grandartiste kunigis penson, sonon kaj movon en absoluta harmonio.

Kiam je la fino de lia vivo, pli juna generacio malkovris Gezelle, granda estis la miro, ankaŭ en Holando, „ke tio kio estis formulita en la lastaj jaroj de la 19a jarcento kiel la idealo de la poeziarto, jam de post 1858, nesciate estis floranta, en plena trankvila beleco en la flandra ĝardeno.”

August Vermeylen, la sagaca konanto de la nederlanda kaj eksterlanda literaturoj, parolante pri la flandra majstro, karakterizas jene lian arton:

„La miregaĵo en la verko de Gezelle, kiun certigas al ĝi unikan lokon en la eŭropa literaturo, ne estas tiu senco por ĉiuj nuancoj de la vivo, ne estas tiu elasta diverseco de ritmoj en kiu li kaptas ĉiujn faldojn de la vivo, sed ke tiom da arto ĉi tie ja estas kunigita kun tiom da malafekteco, ke la plej sensitiva restas tiel rekta kaj simpla. Tiuj poezioj konservas la odoron de la tero, eĉ tie kie ĝi produktas la plej maloftajn florojn. Ĝi estas eksterordinare genia kaj tamen nevelkeble freŝa. Frandaĵo por frandemuloj kaj tiel pura kaj sana kiel pano. Nobelgusta literaturo, kiu neniam ĉesas esti natura. Neniu estis samtempe tiel artista kaj tiel popola. La ŝajne plej serĉata dancas je la ario de la simpla kanto, kiu sonas tra stratoj kaj placoj. Neniu distanco inter la komuneco kaj la artisto: la vojo kiu kondukas al la suproj supreniĝas iom post iom preskaŭ neperceptebla de la ebenaĵo, kie loĝas ĉiuj.”

Guido Gezelle estas unu el la plej grandaj poetoj nederlandaj el ĉiuj tempoj. Li estas granda kaj vera poeto, ĉar en ĉiu verso ni aŭdas alte noblan viron. Lia arto intime kunfandiĝis kun lia homeco, ĝi estas la spegulo de lia interno. Kiel pastro li estis saturita de dolĉa, riĉa, infana, religia sento. Kiel pentristo de la flandra naturo li kunvivis kun ĝi en plej intima komuniĝo. Kiel artisto de la vorto li kreis al si propran lingvon, klarigilon de eksterordinara riĉa animo. TYNEVERUM.

LA OKULOJ MALFERMIĜAS!

La publika letero al la estraro de la „Belga Ligo” de nia amiko Max Van Ghendt el Sta. Nikolao kaŭzis grandan sensacion en la esperantistaj rondoj. Ke li ne estas la sola, kiu iĝis malkontenta pro la agado de la Belga Ligo-estraro, tion pruvas la konsento, kiun lia letero ĉie renkontis.

Ankaŭ la Kortrejkaĵoj esperantistoj ne estas kontentaj. Jen artikolo el *Nia Informilo*, la ligilo inter la geesperantistoj de la Kortrejka regiono, en kiu la sintenado de la Belga Ligo-estraro ne estas malpli severe kritikata ol en la publika letero de S-ro Van Ghendt:

„Ekde kelke da tempo, precipe okaze de ĝeneralaj kunvenoj, estis ofte kaj ripete kritikitaj la agoj de la oficiala esperantista centro en Antverpeno, kiu ĉu konscie ĉu nekonscie mortigas la enlandan movadon.

Necesus ekzameni aparte la respondecon de la Belga Esp. Ligo kaj tiun de la Belga Esp. Instituto, sed ŝajne tiuj du organizoj tiom kunfandiĝis, ke al profanulo ne plu estas eble dispartigi la respondecon.

Je starigo de la Kortrejk-a grupo en 1928, ni kontaktis kun (laŭ nia opinio) bone gvidata centra oficejo. Plej afable ni ricevis ĉiujn demanditajn helpojn por fruktedononta propagando kaj reciproke entuziasme servemaj, ni kvitancis per varbado de novaj liganoj.

La feliĉo tamen ne longe daŭris. La prepara laboro por la internacia kongreso malhelpis la ligan laboron. „Belga Esperantisto” akaparita por tedaj listoj de kongresanoj, malaperis tuj kiam ĉiuj listoj aperis. Estis la momento kiam ni komencis varbadon de novaj membroj okaze de la 2a esp. kurso, gvidata de S-ro Groverman en la urbdomo. Pagintaj abonantoj ne ricevis bultenon; la grupgvidantoj sendis plendon post plendo, sed vane. La kongresa laboro estis tiom granda, ke eĉ ne estis ebla respondeto kaj inter la amaĝego de Antverpenaj Esperantistoj verŝajne ne troviĝis eĉ unu samideano, kiu konsentis iom kunlabori. Tiu neakceptebla silento ege malhelpis nian lokan movadon kaj ĉe multaj tute senkreditigis la Belgan ligon. Unu jaron post la kongreso tiu malĝojiga stato ne jam likvidiĝis. Oni kulpigis la presiston pri neregula apero de la bulteno; tamen intertempe estis sukcese eldonita nova revuo „Flandra Esperantisto”!

SUBTENO POR NIA REVUO.

Ciunonate: Fik, 10.—; Gis, 10.—; Jan, 10.—; Mart, 10.—; Jos, 10.—; Jef, 10.—; Leo, 10.—; John Théry, 20.—; Piet, 20.—; Kolektite dum agrabla kunestado de anoj de la Flandrema Grupo kaj de „Al Triumfo” en Sta. Nikolao post kantado de Max, 40,60; Van H., Herenthals, 15.—; Dh., Audenaerde, 10.—; S-ino Roskes, 5.—; Vanhoyweghen, 2.—; Verelst, Lier, 10.—; *entute*: 192,60 frankoj.

1830

Guido Gezelle

1930



Ĉi tiu linoleumgravuraĵo estas farita de S-ro Frans Van Immerseel el Antverpeno. Ĉi tiu juna artisto jam verkis vere interesajn artaĵojn, i. a. la glumarkon eldonita de la Flandra Komitato por la memorfesto de Gezelle. Ni tre esperas, ke niaj flandraj kaj nederlandaj samideanoj aĉetos kaj uzos tiujn glumarkojn por propagandi por la flandra festado de Gezelle. La glumarkoj estas haveblaj po 2 frankoj por 100 ĉe la "Joe English Gilde", kies sekretario estas ĉe Frans Van Immerseel, Lange Van Bloerstraat, 113, Antwerpen; poŝtĉekkonto : 2781.90.

RICEVITAJ REVUOJ.

Holanda Esperantisto, 100, 101; Espero Katolika, 72, 73, 74; Esperanto (Nippon), 55-58, 59; Dordrechta Esperantisto, 13; Marto, 1; Vegetarano, 4; Oomoto Internacia, 38a; La Movado, 128; Bulgara Esperantisto, 4; Informoj de E. A. E., 95; Ondo de Daŭgava, 1; Aŭroro; La Progreso, 1; Laborista Esperantisto, 2; Oomoto, 1; Lingvo Internacia, 4; Internacia Stenografisto, 32; Sennaciulo, 273; Hispana Esperanto, 1; International Language, 7; The British Esperantist, 298; Reinaert, 2, 3; Breiz Atao, 84, 85, 86, 87; De Vlok, Dec.; Het Hoefijzer, 19; De Stroom, 79; Neerlandia, 1, kun noto pri nia revuo; L'Avenir d'Oostduinkerke, 22, kun artikolo tradukita el nia revuo.

1a FLANDRA KONGRESO DE ESPERANTO

Antverpeno, 7an-8an-oan de Junio 1930.

Honora Prezidanto: S-ro Frans Van Cauwelaert, urbestro.

Diversaj Sciigoj. — S-ro FRANS VAN CAUWELAERT, urbestro de Antverpeno, akceptis la honoran prezidantecon de nia 1a. Flandra Kongreso de Esperanto.

— Ni memorigas, ke la partoprenantoj de nia kongreso ĝuos fervojan rabaton de 35%.

— Uzu niajn propagandajn glumarkojn!

— Aliĝu kiel eble plej baldaŭ por plifaciligi la laboron de la kongresoficejo.

— Sendu proponojn por la ĝenerala kunveno al la sekretariino de la L. K. K., F-ino Martha Vervloet, Gravinstraat, 32, Borgerhout-Antwerpen.

PROVIZORA PROGRAMO DE LA KONGRESO

SABATE: Malfermo de la akceptejo. — Kabaredvespero, agrabligota i.a. de nia ŝatata esperantista kantisto H. Moy Thomas, ĉefdelegito de U.E.A. en Londono, simpatiinda germana migrulo Martin Fehr, k.a.

DIMANĈE: Kunveno de la kongresanoj en la akceptejo. — Ev. esperanta diservo. Ev. Oficiala akcepto. — Inaŭguro de nova flago de Flandrema Grupo Esperantista. — Kunveno de la kongresanoj, dum kiu i.a. estos starigata la Flandra Ligo Esperantista. — Fotografado de la kongresanoj. — Festeno; prezo: 25 frankoj. — Promenado tra la urbo. — Arta koncerto kaj reprezentado de „Bietje.”

LUNDE: Vizito de la ekspozicio. — Ev. Sonorilarkonzerto. — Adiaŭa vespero.

Pli ol verŝajne filmo estos farata de la 1a Flandra Kongreso de Esperanto.

La kongreskarto kostas 10,— frankojn.

Flandraj esperantistoj, dum Pentekosto vi troviĝos en la flandra urbo Antverpeno!

Same la aferoj de „Belga Esp. Instituto” fuŝiĝis. Mendo de poŝtkartoj ilustritaj tiom prokrastis, ke intertempe la prezoj altiĝis. Liverado ankaŭ tiom longe daŭris kaj estis plenumita nur post la kurso, kiam amasa vendo ne plu estis ebla.

Okaze de publika kurso, lernolibroj menditaj ekspresletere ne alvenis. Pluraj tagoj post nova demando per telegramo, ili estas sendataj sen ia ajn vorto de klarigo... Ne estis koncerto da laŭdoj kiun oni aŭdis tiu-okaze... Ni tamen estis bonaj klientoj de la Instituto.

Sekve al tio ĉio, nia plej bona respondo estos ke ni restu kiom eble plej pasivaj kontraŭe al la Ligo kaj la Instituto. Tia indiferenco havis ankaŭ iom neatenditan rezulton.

Multajn vortarojn ni jam vendis kaj ankaŭ vendus. Ni traktis kun loka librejo por ke ĝi venigu „Schidlof's” vortarojn el Holando. Ili ne estis haveblaj ĉe la eldonisto pro la fakto, ke la „Instituto” havis solvendrajton. Kvankam tio, la vortaroj alvenis en Kortrejk-o, kie ili estas publike vendataj 13,15 frankojn. Ĉe la „Instituto” la prezo estas 20 frankoj. Grupoj ricevas rabaton de 10% sed devas pagi la sendkostojn. El tio sekvas, ke niaj Antverpenaj amikoj aldonas unue 10% por poste per grandanima gesto redoni tiun procentegon!

Provo estis ankaŭ farita per aĉeto de la libro „Vila Mano.” La Instituto ĝin vendas po 55 frankoj. En Kortrijk ĝi estas havebla po 47,50 frankoj.

Iam, iu kredis ke estas permesate skribi pri tio al la Instituto, sed serene estis demandite ĉu oni donis al si ideon pri la oferoj de kelkaj, por ke tiuj libroj estu aĉeteblaj? — Ĉu la oferoj estas pli grandaj ol tiuj de privata vendejo? Ĝi verŝajne ankaŭ ne vendas sen gajno.

Verŝajne kelkiuj opinios, ke oni tro multe grumblas pro kelkaj post-militaj frankoj.

Tamen oni ne forgesu, ke ni staras ankoraŭ tro malfortaj por forlasi la idealistan terenon kaj konsideri esperantismon kiel komerca varo.

Tiuj konsideroj profunde senkuraĝigas tiujn, kiuj celante nek profiton nek famon, senlace laboras por la Zamenhofa idealo.

Ĉiuj Esperantistoj certe sincere bedaŭros la senloran disfalon de la Ligo. Ne sufiĉis, ke ĝi jam tiom malfortiĝis; senkonscie la ligestro metis la kronon sur ĉion per la mallerta aranĝo de la oficiala akcepto de la urbestro de Gento. Ne necesis organizi kongreson en Flandrujo se ĉio okazas franclingve. Kiam la urbestro rifuzis paroli frandralingve kial ne rezigni je lia ĉeesto?

La „Flandra Ligo” decidis organizi propran kongreson en Antverpeno. Sed kial ĝi elektis por tio Pentekoston? Ĉie estis konate, ke la Belga ligo kongresos la samajn tagojn. Ĉu oni jam pripensis, ke unu el la du aŭ eble ambaŭ malsukcesos pro tio?

La Lieĝaj samideanoj ne kulpas pri la ligaj eraroj; estas do ne multe malice malhelpi ilian laboron.

Jam pli frue estis preparolata eventuala organizo de la venonta kongreso, sed la nunaj okazintaĵoj tute malebligis tion. Tiom longe ol unueco ne plu regos, ni rezignos.

Same pri abono al iu Bulteno. Ĉiu membro restos libera ĉu aboni ĉu neaboni unu el la du naciaj presaĵoj. Intertempe ni daŭrigos la eldonon de nia propra „Informilo,” kiu provizore estas la oficiala ligilo inter niaj gemembroj.

La estonteco decidis pri nia venonta agmaniero.”

Kvankam multe estas substrekinda en la supre citita artikolo, ni ne substrekis ion kaj ankaŭ ne aldonos niajn rimarkojn; eĉ ne substrekte, ne pligrandigite la faktoj parolas por si mem.

Sed ni klarigos, kial ni (ne la dum nia kongreso fondota „Flandra Ligo”) organizis la Flandran je l' dato de la Belga kongreso.

Mallonge: ni opinias, ke Pentekosto estas la plej taŭga dato por kongreso kaj ĉefe ke, precipe je l' komenco, la kampoj devas esti bone limigitaj. Krom tio, la sukceso de kongreso ne dependas de la kvanto de la kongresanoj, sed de ilia kvalito, ilia laboremo.

La 1a. Flandra Kongreso de Esperanto estu ne nur amuza, sed antaŭ ĉio fruktedona laŭ organiza vidpunkto!

BIBLIOGRAFIO.

(Ni recenzas duope senditajn verkojn, unuopajn ni citas.

Ĉiu verko estas havebla ĉe „Flandra Esperanto-Instituto.)

Kion volas Paneŭropa Unio? — Esperantigis D-ro E. Sós. Eldonis: Paneuropa-Verlag, Wien-Paris-Leipzig. 16 paĝoj; 15x23 cm. Prezo: nemontrita.

Tre interesa propaganda broŝuro pri la celado de la Paneŭropa Unio, kiu havas Esperantan Sekcion, kies adreso estas Hofburg, Wien I, Aŭstrujo.

La Flandroj kun ĝojo ekscios, ke „la paneŭropa movado rifuzas ĉiun provon al trivialigo de naciaj kulturoj de Eŭropo al unueca miskulturo. En tiu senco ĝi aprobas la nacian ideon kaj vidas la kulturan estontecon de Eŭropo en kunlaboro de liberaj nacioj.”

„Ĉiu granda historia okazaĵo komenciĝis kiel utopio kaj finiĝis kiel realaĵo.” Ankaŭ la ideo de R. N. Coudenhove-Kalergi iam efektiviĝos; ni estas certaj pri tio, same kiel pri la baldaŭna libereco de Flandrujo!

— J. V. S.

MARŝKANTO DE L' BLINDULOJ DE LA NEDERLANDA GENTO

Teksto de ERIK WILAERT.

Muziko de FRANS FITEN.

Alvenu, blindaj kamaradoj,
Per sama kunigitaj sort'
Por ke publike ja resonu
Nia postul' kun pli da fort',
Al ĉies kor' la vojon trovu
Humana nia rajtpostul',
Ĝi eĥu ĝis la en la lando
Plej alta aŭtoritatul'.

Kiel profunde la amara
Necerta pano naŭzas nin!
De malriĉeco kaj mizero
Alproksimiĝu nun la fin'.
Ke nur la ŝtat' alporti povas
Al ni ĉi tion, scias ni;
Popol', apogu nian celon,
Vi, kor' kaj forto de l'soci'.

Postulas ni por la blinduloj
Edukon en instituci';
Nur kiu estas edukita
Laboran ĝojon trovas li.
Finfine sian devon lernu
La ŝtato kontraŭ la infan';
Ne povas al infano manki
Dum la junec' formanta man'.

La nigraj tagoj ja forestas,
Ke, je la honto de la ŝtat',
Blinduloj devis almozpeti
Ĉe la angul' de plac' kaj strat'.
Sed ĉar por help' efika vere
Ne preta estis la homar',
L'almozpetad' ankoraŭ restis
Privilegio de l'bonfar'.

Laboron por ni, ni postulas,
Nutraĵon por la korp' kaj kor',
Kaj kiel rajton la salajron,
Almozon ne por la labor'.
De nia celo jen la kerno
Kaj sonu tial nia kri':
Rifuz' de tio: ŝtelo estas
De kio estas ja de ni.

Postulas ni, ke maljunulo,
Ne plu kapabla por labor',
Ne devu klini pro dependo,
Malriĉo, zorgoj kaj dolor'.
Nek akra plend', nek mondonacoj
Nin liberigos, nek kompat';
Ni restos ĉiam mizeruloj
Sen la kunhelpo de la ŝtat'.

Ni ne posedas mem l'armilojn
Por plibonig' de nia sort';
Popol', nur via kunluktado
Estas la nin savonta fort'!
Etendu al ni do la manon,
Insista jen nia demand';
Pli bonaj tagoj tiam venos
Por la blinduloj en la land'.

REKANTAĴO

Montru vian celon:
Lokon por blinduloj sur la ter',
En nia vivo ankaŭ
Ja estu tagoj sen sufer'!

Tradukis MARTHA VERVLOET.

PRI LA PSEUDO-“KATALUNA ESPERANTISTO”.

En nia Decembra numero ni skribis, ke ni tute ne fidis, la ree aperintan revuon *Kataluna Esperantisto*. Ni estis pravaj, ĉar jen kion skribas unu el niaj Katalunaj amikoj:

„Efektive vi estis pravaj suspektante la nunan Kataluna'n Esperantisto'n kaj ne fidante tiun nunan revuon. Vi ankaŭ prave konjektis, ke ĝi kaŝas ruzon. Ni faru historion.

„Pro politikaj cirkonstancoj instigitaj de kelkaj el la nunaj direktantoj de la pseŭdo-federacio, la malnova Kataluna Esperantista Federacio ne plu povis funkcii laŭ sia katalunema idealo. Tiam, profitante la personan timon pro persekutado de kelkaj Katalunoj antaŭaj direktantoj de la K. E. F., la nunaj komitatanoj ruze ŝtelis la direktajn postenojn de la Federacio; ili ankaŭ aliigis la nomon, ŝanĝis la regularon kaj metis la revuon en la manojn de nova redaktaro. Ne necesas diri, ke la nuna komitato de la Federacio estas formita el amikoj de la nuna regoformo. Kiel esperantistoj ni tute respektas la ideojn de tiuj sinjoroj. Ĉiu rajtas havi kaj defendi siajn proprajn ideojn kaj politikan opinion, eĉ se ĉi tiu politika opinio estas nur „stomaka,” sed ruze agi kaj tiamaniere konfuzi la esperantistaron, ĉi tio estas vere kondamninda.

„Ĉar ne ĉiu persono flaras tiel perfekte kiel la flandraj amikoj kaj aliaj, kiuj aktive sekvis nian katalunan movadon, jen kial la nunaj direktantoj de la Federacio trompe agis. Ili volis konfuzi. Kiamaniere?

„Ili rebaptis la Federacion je „Katalun-Baleara Esperantista Federacio,” nur ĉar tiamaniere oni povas kredi, ke ĝi estas daŭrigo de la antaŭa federacio; ili metis la streketon post' la vorto kataluna, farante tute malkorektan vorton katalun-baleara, ĉar tiamaniere ili povas uzi por la mallongigo la literojn K. E. F. ĉie konatajn. Ili ankaŭ uzis la adresaron de la antaŭaj anoj de la federacio por se eble envicigi ilin, sed ili ne sukcesis ĉar malmultaj akceptis la ŝanĝon. Ili aperigas nian revuon sub la sama titolo, sed kiel vi prave diris, ĝi similas la antaŭan nek laŭ aspekto nek laŭ enhavo.

„Oni publikigas la artikolojn ĉu katalune, ĉu hispane, ĉu esperante. La Hispanoj ja havas sian propran revuon kaj nia antaŭa Kataluna Esperantisto ĉiam aperis nur esperante kaj katalune.

„Ankaŭ por erarigi la legantojn oni indikis por la ofico de redaktoro iun s-ron J. Grau Queralt, absolute nekonata de la kataluna esperantistaro kiel verkisto aŭ eĉ redaktoro de similaj aĵoj, nur ĉar lia nomo similas tiun de s-ro J. Grau Casas, Lingva Komitatano kaj dum longa tempo redaktoro de *Kataluna Esperantisto*.”

Ŝajnas al ni, ke ĉi tiuj detaloj ŝufiĉas, por montri ke nia rimarko pri la nova maskita Kataluna Esperantisto estis tute prava.

Nia kataluna amiko aldonas:

„La kataluna esperantistaro, espereble, baldaŭ denove vekigĝos, ĉefe ĉar la nuna diktatoro laŭŝajne baldaŭ malaperos kiel reganto kaj ĉar tiam la cenzuro ne plu ekzistos kaj ĉiuj ree klare povos eldiri siajn opiniojn. Ni tiam ree alten tenos nian standardon kaj denove enyicigos en la *Kataluna Esperantista Federacio* ĉiujn malnovajn batalantojn.”

Kuraĝon! ni krias al niaj katalunaj amikoj, kuraĝon! Vi iam povos senmaskigi la samideanojn(?!), kiuj perfidis vin! Vi ree povos libere spiradi kaj libere servi per Esperanto vian patrujon! La flandraj esperantistoj, kunsentas, esperas kun vi!

Esperanto door Zelfonderricht.

ACHTSTE LES

Vertalingen der zevende les

Traduko. — Tiu libro estas verda. Ĉi tiu estas mia libro. Mi ne parolas pri ĉi tiu viro, sed pri tiu. Kies estas tiu domo? Ĝi estas de iu, kiun mi ne konas. Tiuj kiuj estas blindaj, estas malfeliĉaj. Kiun vi serĉas? Estas mi, kiu faris ĝin. Kia bela rozo! La sinjorino, kies filino estas via lernantino, alvenos morgaŭ. Ĉiu minuto estas multekosta. La infanoj manĝis ĉiujn pomojn. Mi vidis nenium. Neniu estas certa pri la horo de sia morto. Ĉiu parolas por si mem. Kiam li venos? Nun aŭ neniam! Kial? Tial! Tia lernejo, tia popolo. Kiam jukas ĉe la imperiestro, la popoloj devas sin grati. Ŝi ne kantis, ŝi kantaĉis.

Vertaling. — Zij, die een goed geweten hebben, zijn gelukkig. Wie (kiu) deed dit? Eén van de jongens. Welke? Deze. Dat zijn juist dezelfde zakdoeken als die, welke ik verleden week kocht. Welk is uw naam? Zeg ten minste uit welk land gij komt. Het is ons steeds aangenaam enkele uren bij onze vrienden door te brengen. Niet alle kinderen verdienen de liefde hunner ouders. Het tegenovergestelde komt ook voor. Wiens beurt is het om te schrijven? De twee kinderen, die ernstig ziek waren, stierven gisteren. De stad, in dewelke wij wonen, is zeer groot. Het jongetje, wiens vader plotseling overleed, woont in ons huis. Wat waar is, is niet steeds aangenaam. Antwerpen is een stad, welker bevolking grootendeels Vlaamschgezind is. Stel niet uit tot morgen, wat gij vandaag doen kunt. Wees vriendelijk voor ieder. Gedurende een oorlog verschuilen de patriotards zich ergens ver van het front in een of ander bureel. Bemeester uwe gevoelens.

— Andere voegwoorden dan die in de tafel der 7e Les voorkomen zijn: *anstataŭ*, in plaats van; *antaŭ ol*, vooraleer; *ĉar*, want; *ĉu*, of;

ĝis, tot; *ke*, dat; *kiam*, toen; *kvankam*, alhoewel; *kvazaŭ*, alsof; *laŭ*,
tio se, volgens; *por ke*, opdat; *se*, indien; *se ne ke*, ten ware dat; *tial...*
ke, omdat; *tuj.. kiam*, zoodra.

— Na een voegwoord volgt de *aantoonende wijze* wanneer de handeling zeker is, de *voorwaardelijke wijze* wanneer er onzekerheid is, de *bijvoeglijke wijze* wanneer de werking als *doel* voorgesteld wordt. Voorbeeld: *Kvankam mi tre ŝatas lin*, niettegenstaande ik veel van hem houd; *se mi havus tempon*, indien ik tijd had; *estas necese, ke vi skribu al li*, het is noodig, dat gij hem schrijft.

— *Moŝto* is een titel van beleefdheid, als Hoogheid, Doorluchtigheid, Eerwaarde, enz.: *Reĝa Moŝto*, Sire; *Kardinala Moŝto*, Eminentie; enz.

— Het achtervoegsel *Aĵ* duidt konkrete zaken aan: *aĵ*, iets; wordt ook gebruikt voor vleesch. *Altaĵo*, hoogte; *senvaloraj aĵoj*, waardeloze dingen; *ŝafaĵo*, schapenvleesch.

— *EC* vormt afgetrokken, abstrakte naamwoorden; *alteco*, hoogte; *boneco*, goedheid; *amikeco*, vriendschap.

Vertaal. — Ik kan den naam van dien man niet zeggen, want ik ken hem niet. Ik was niet te Parijs, maar in Londen. Neem een regenscherm mede, want het zal regenen. Zoodra ik nieuws ontvangen zal, zal ik het u laten weten. Ik weet niet, of zij thuis is. Spreek luider, opdat ik u kan verstaan. Wacht totdat ik terugkom. Ik weet niet waarom hij dit deed. Het was zóo donker, dat wij niets zien konden. De eenen werken, terwijl de anderen niets doen. Ik zal met u meegaan, als ge wilt. Antwerpen zal weldra een merkwaardig gebouw meer bezitten. Ik leef met hem in goede vriendschap. De beenhouwer in onze straat verkoopt slechts paardenvleesch.

WOORDENLIJST.— Parijs, Parizo; Londen, Londono; regenscherm, pluvombrelo; nieuws, novaĵo; laten weten, sciigi; luid, laŭte; wachten, atendi; merkwaardig, rimarkinda; gebouw, konstruaĵo; bezitten, posedi; beenhouwer, buĉisto; verkopen, vendi.

Traduku. — *Mi restos hodiaŭ hejme, ĉar pluvas. Mi tre ŝatus veni, sed mi ne havas tempon. Estis tre bona vetero, kiam mi alvenis en Ljero. Ni ne scias, ĉu li estas tie ĉi. Tuj kiam mi finis mian laboron, mi eklegis. Malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj, ni persistos. La mortigo de homo estas dum milito heroaĵo; tion oni almenaŭ diras. Kvankam mi ne estas riĉa, mi helpos laŭ mia povo. Hieraŭ mi renkontis vin, sed vi ne vidis min. Honesteco antaŭ ĉio! La juneco de la spirito estas eterna kaj la eterneco estas la juneco. Kia infanaĵo! La alteco de tiu ĉi monto ne estas tre granda. Tiu libro ne estas legaĵo por infanoj.*

WOORDENLIJST. — Persisti, volhouden; heroo, held; honesta, eerlijk; spirito, geest.

INTER NI

El Sta. Nikolao. — *Al Triumfo.* — La 19an. de Januaro okazis vizito de geamikoj el la Antverpena Flandrema Grupo. Multnombre ili alvenis piede kaj estis bonvenataj je la 1a. apud la „Ster” de la loka sekretario. Post komuna manĝado la Antverpenanoj kaj Al Triumfanoj sin renkontis en nia ejo „Rubenspaleis” kaj tie faris grandan honoron al la rusa salato kaj haringlumbaĵoj prezentataj de nia gastejestro De Corte. Sekvis intima kunestado, dum kiu oni kantis, deklamis kaj bonege sin amuzis ĝis la kruela horo de l’ vagonaro alvenis. Bonega, amika renkonto estis tiu vespero.

S-ro Van Schoor, nia Jan, vizitis nin la 7an de Februaro kaj interespene parolis pri siaj poemoj kaj verkoj. Li kaptis la simpation de niaj gemembroj kaj montris sin lerta en la granda arto de amo kaj... kisado. Estas kompreneble, ke post klarigoj rilate al „Ameli’,” niaj membrinoj aĉetis tuj la interesan poemaron „Amo kaj Poezio.” Nia Jan ankaŭ parolis pri la traduko de „Pallierter” kaj legis la bonhumoran ĉapitron „La Duelo.” Oni nun esperas, ke baldaŭ „La verda Velo” eldonos „Pallierter.” — Jan, „Al Triumfo” vin dankas kaj esperas baldaŭ revidi kaj reaŭdi vin en Sta. Nikolao.

Nova kurso, gvidata de S-ro Van Ghendt malfermiĝis kaj novaj amikoj aliĝis. La kurso okazas nun flandralingve.

Ankaŭ la abonantaro de „Flandra Esperantisto” kreskas kaj baldaŭ la plimulto de niaj geanoj estos abonantoj.

La grupo diskutadis pri la cirkulero de la esperantistoj el Kortrijk kaj ilin gratulas. La esperanto-movado bezonas novan sangon kaj nian junan amon por frateco kaj idealo. Kie do restas Aalst, Lier kaj multaj aliaj?

El Antverpeno. — *Flandrema Grupo Esperantista.* — En Januaro ni faris ekskurson al Sta. Nikolao kaj en Februaro al Liero; ambaŭfoje piede. La vintro ne timigas nin kaj la marŝado „tra ĉia vetero kaj vento” ŝtaligas la koron kaj la muskolojn. En ambaŭ urboj ni pasigis kelkajn agrablajn kaj neforgesotajn horojn.

La 26 an. de Februaro okazis nova filmvespero ankoraŭ pli interesa ol la unua. S-ro Meire, bona amiko de nia grupo, denove venis kun sia amiko S-ro Crols, reprezentanto de la Kodak-aparatoj en Antverpeno, kies magazeno troviĝas Meir, 15.

Dimanĉe, la 16an. de Marto, je la 7a. vespere, okazos en nia sidejo „Pannenhuis,” Conscienceplein, 3, pulĉinela reprezentado de „Peĉjo en l’Infero” per la „Pax”-societo. Invitkartoj estas haveblaj ĉe la membroj de la grupo. Ni esperas, ke la anoj de la aliaj esperantistoj grupoj venos multnombre al tiu vespero kaj speciale ni invitas niajn geamikojn el Sta. Nikolao, Liero, Aalst kaj Mehleno. — *Mart,*

Flandra Esperanto Instituto

Gravinstraat, 32

BORGERHOUT-ANTWERPEN

Poŝtĉekkonto 2427.03

Presado - Eldonado - Librovendado

Propagando - Instruado.

Petu niajn prezojn !

ESPERANTISTEN !
BLINDENVRIENDEN !

ABONNEERT U

op het maandblad van het

Algemeen Blindenverbond
van Vlaanderen

29, Rijselsche baan, Antwerpen-West

Jaarlijksche bijdrage : 10, 30 of 100 frank.

Postcheck 195.224.

Helpt daadwerkelijk de
Vlaamsche blinden.

Ĉiu literaturema esperantisto devas
posedi la belegan poemaron

AMO KAJ POEZIO

de Jan van Schoor

kaj LA DU AMATINOJ

kun

LA KAPRICOJ DE MARIANO

de Alfred de Musset,

Tradukitaj de Jan van Schoor

kaj rekomendita de Esperantista

Literatura Asocio.

La prezo estas nur po 2 belgoj (send-
kostoj enkalkulitaj).

Ambaŭ verkojn mendu ĉe „Flandra
Esperantisto” aŭ ĉe „Flandra Espe-
ranto-Instituto”.

PAUL KUTSUKIAN.

Ĝenerala agento por la provincoj
Antverpeno, Okcident-kaj Orient-
Flandrujo de la aŭtomobiloj kaj
ŝarĝveturiloj

REO

Ĝenerala agento por la provinco
Antverpeno de la tirveturiloj

INTERNATIONAL

TELEFONOJ : 916.48 - 985.15

Laborejo kaj Ekspozicia salono :
BELGIËLEI 149, ANTWERPEN.

Algemeen Vlaamsch Huis

„MALPERTUUS”

S. POT - HANSEN

Frankrijklei, 8 - Antwerpen.

Bekend voor zijn extra dranken

o. m. Dortmunder, Spalterbräu,

Leeuwenbier.

HUIS DE LEY

Driekoningenstraat. 43, Berchem.

De Ley & Verschueren

CITÉ

N^{rs} 143-144-145-146-147-179-180-
208-209

Groote keus in Vrouw- Manstoffen

Zijde, Fluweel en Voeding.

Goed koud buffet Goede bediening.

Drukkerij E. SELE, Prinsesstraat, 11, Antwerpen.